

# EL POPOLA ĈINIO

人民中國報道

EN TIU ĜI NUMERO:

Marso de Maŭ Ze-tung

La Movado de Pliprodukto kaj Sparo en Nordorienta Ĉinio

Riĉa Rikolto post Ok Senfruktaj Jaroj

La Dogano de Nova Ĉinio

Disvastigo de Kulturaj Centroj en Ĉinio

La Kotonmaŝino

Monata Informa Bulteno Eldonata de Fremdlingva Eldonejo  
Redakcio kaj Administracio: 26 Kuo Hui Chieh, Peking, Ĉinio

VOL. II N-RO 11  
NOV. 1951

## LA ESTONTA MONDO, POPOLA MONDO

— La Malferma Parolado de Prezidanto Maŭ Ze-tung ĉe la Landa Komitato de la Popola Politika Konsiliĝa Konferenco —

Membroj de la Komitato, Kamaradoj:

Nun malfermiĝas la tria kunsido de la Unua Landa Komitato de nia Popola Politika Konsiliĝa Konferenco. La kunvenon ĉeestas, krom la membroj de la Landa Komitato, tiuj kiuj estas speciale invititaj el la ĉinaj popolaj volontuloj, la Popola Liberiga Armeo, industriaj kaj agrikulturaj labor-modeloj, reprezentantoj el la malnovaj revoluciaj bazoj, edukaj laborantoj, literaturaj kaj artaj laborantoj, industriistoj kaj komercistoj, diversaj specialistoj, reprezentantoj de religiaj rondoj, naciaj minoritatoj, elmigrintaj ĉinoj, virinoj, junuloj, provincaj kaj municipalaj konsiliĝaj komitatoj kaj aliaj sekcioj de laboro kaj multaj registaraj kadroj. Membroj kaj invititaj reprezentantoj ĉi tie inkludas multajn batalheroojn, industriajn kaj agrikulturajn labormodelojn kaj modelajn laborantojn publike agnoskitajn de la popolo. La skalo de nia nuna kunveno plene reprezentas la grandajn atingojn kaj progreson de la Ĉina Popola Respubliko sur ĉiuj frontoj.

La tri grandaj movadoj kiuj disvolviĝis en nia lando dum la pasinta jaro—rezisto kontraŭ Usono kaj helpo al Koreio, agra reformo kaj subpremo al kontraŭrevoluiciuloj—akiris grandajn venkojn. La restantaj kontraŭrevoluiciuloj sur la ĉeftero baldaŭ fundamente eliminiĝos. Agra reformo kompletigos en la jaro 1952, escepte de kelkaj regionoj kie loĝas naciaj minoritatoj. La tuta ĉina popolo senprecedence vaste unuigis en la movado rezisti Usonon kaj helpi Koreion kaj entreprenas decideman lukton kontraŭ la Usona imperiista invado. Esprimante la grandan volon de la ĉina popolo, la ĉinaj popolaj volontuloj frakasis, kune kun la Korea Popola Armeo, la freznan planon de Usona imperiismo okupi la Korean Demokratian Popolan Respublikon kaj poste invadi la ĉefteron de Ĉinio, kaj tiel kuragiĝis la pacamajn popolojn de Koreio, Ĉinio, Azio kaj la tuta mondo, firmigante ilian fidon en defendo de paco kaj kontraŭstaro al agreso. Ni devas esprimi niajn gratulojn kaj respekton al la heroaj ĉinaj popolaj volontuloj kaj la Korea Popola Armeo!

Dank' al la venkoj jam akiritaj en la tri grandaj movadoj kaj la komunaj penoj de ĉiurangaj popolaj registaroj kaj ĉiuj rondoj de la popolo, nia lando jam atingis unuecon senprecedencan. La Tibeta problemoj jam solviĝis per paca rimedo. Nia nacia defendo jam plifortiĝis. La popoldemokratia diktatoreco jam fortiĝis. Kaj nia financo kaj varprezoj restas stabilaj, kaj ankaŭ la restarigo kaj disvolvo de niaj ekonomia konstruo kaj kultura kaj eduka laboro faris grandan paŝon antaŭen.

La patriota movado por pliiĝi produkton, kiu disvolvas sur la industria kaj agrikultura fronto estas nova celebrinda trajto en nia lando. Post la efektiviĝo de agra reformo en la vilaĝoj kaj la demokrata reformo en la industriaj entreprenoj, la laboristoj kaj kamparanoj jam akiris la eblecon disvolvi sian plej grandan iniciativon en la movado pliiĝi produkton kaj la eblecon plibonigi sian materian kaj kulturalan vivon. Se nur ni efike unuigas la laboristojn kaj kamparanojn, donas al ili edukon kaj apogon nin sur ili, en nia lando certe aperos universale leviganta patriota movado por pliiĝi produkton.

Sur nia kultura kaj eduka fronto kaj inter la diversaj intelektuloj, jam disvolviĝis movado de memeduko kaj memremuldo bazita sur principoj difinitaj de la Centra Popola Registaro. Ankaŭ tio estas nova celebrinda trajto en nia lando. Je la fermo de la dua kunsido de la Landa Komitato,

mi proponis la uzon de kritiko kaj memkritiko por memeduko kaj memremuldo. Nun ĉi tiu propono jam paŝon post paŝo efektiviĝis. La ideologia rimuldo, precipe tiu de la diversaj specoj de intelektuloj, estas unu el la gravaj kondiĉoj por la ĝisfunda efektiviĝo de demokrata reformo en diversaj kampoj kaj la paŝo-post-paŝa efektiviĝo de industriigo en nia lando. Tial ni esperas, ke estos ankoraŭ pli grandaj sukcesoj en la firma paŝa progreso de ĉi tiu memeduka kaj memremulda movado.

Ĉiuj faktoj pruvas ke nia sistemo de popoldemokratia diktatoreco estas multe pli supera ol la politika sistemo de la kapitalistaj landoj. Sur la bazo de ĉi tiu sistemo, nia popolo povas montri sian neelĉerpeblan kaj senliman forton.

La granda lukto rezisti Usonon kaj helpi Koreion nun ankoraŭ daŭras, kaj devas daŭri ĝis la Usona Registaro estos volonta pace solvi la problemon. Ni ne deziras invadi iun ajn landon. Ni nur kontraŭstaras al la agreso de imperiistoj al nia lando. Ĉiuj scias, ke se la Usonaj fortoj ne estus okupintaj nian Tajvanon, invadintaj la Korean Demokratian Popolan Respublikon kaj antaŭenpuŝintaj siajn atakojn ĝis nia Nordorienta landlimo, la ĉina popolo ne batalus kontraŭ la Usonaj trupoj. Sed ĉar la Usonaj invadantoj jam nin atakis, ni ne povis ne levi la standardon de anti-agreso. Tio estas absolute

necesaj kaj tute justaj. La popolo tra la tuta Ĉinio jam komprenis ĉi tiujn necesojn kaj justecon. Por daŭrigi ĉi tiun necesan kaj justan lukton, ni bezonas daŭrigi la forton de nia laboro rezisti Usonon kaj helpi Koreion, pliiĝi produkton kaj praktiki rigidan ekonomion por subteni la ĉinajn popolajn volontulojn. Tio estas la centra tasko hodiaŭ de la ĉina popolo kaj sekve ankaŭ la centra tasko de nia nuna kunveno.

Antaŭ longe ni diris ke la korea problemoj devas esti solvata per paca rimedo. Nun ni ankoraŭ tiel opinias. Se nur la Usona Registaro volas solvi la problemon sur justa kaj racia bazo, kaj ne plu uzos ĉiun eblan senhontan rimedon por subfosi kaj prokrasti la intertraktaton kiel en la pasinteco, sukceso en la korea armistia intertraktato estas ebla; alie ĝi estas neebla.

En la du jaroj post la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko, ni akiris grandajn sukcesojn en nia laboro en diversaj kampoj. Ĉi tiujn ni akiris apogate de ĉiuj fortoj kiuj povas esti unuigitaj. Enlande, ni apogis nin sur la firma unueco de la diversaj nacioj, la demokratiaj partioj, la popolaj organizoj kaj ĉiuj patriotaj demokratiaj sub la gvidado de la laborista klaso kaj la Komunista Partio. Internacie, ni apogis nin sur la firma unueco en la tendaro de paco kaj demokratio gvidata de Sovetio kaj la profunda simpatio de la pacamaj popoloj tra la tuta mondo. Dank' al tio, ni akiris la grandajn sukcesojn en nia laboro en diversaj kampoj, neatendite de niaj malamikoj. Niaj malamikoj pensis, ke sennombraj malfacilaĵoj kuŝas antaŭ la nove naskita Ĉina Popola Respubliko kaj plue ili kontraŭstaras nin per invada milito, tial ne estas eble por ni venki niajn malfacilaĵojn kaj rebati la invadantojn. Neatendite de la malamikoj, ni male ja povis venki niajn malfacilaĵojn, rebati la invadantojn kaj akiris grandajn sukcesojn. Niaj malamikoj estas miopaj. Ili ne povas vidi nian grandan unuigitan forton enlandan kaj internacian. Ili ne povas vidi, ke jam por ĉiam finiĝis la epoko de maljusteco de fremda imperiismo super la ĉina popolo, pro la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko. Ili ankaŭ ne povas vidi, ke jam

(daŭrigo sur p. 90)



Prezidanto Maŭ Ze-tung Parolas

# Prezidanto Maŭ Ĉiam en Nia Koro

Kara Prezidanto Maŭ,

Mi estas unu el tiuj kiuj plenkreskis en la liberiga batalado sub la gvidado de vi kaj de la Komunista Partio. Mi memoras, ke ni povis manĝi nur branon kaj legomon antaŭ la liberigo, sed nun greno superabundas ĉe ni ĉiutage. Mia onklo pli ol 50-jara vivis sola pro malriĉeco jam la plejparton de sia vivo, sed li edziĝis tuj post la liberigo. Ĉio ĉi neniam povis okazi antaŭe.

Prezidanto Maŭ, la loĝantoj en nia vilaĝo ĉiam rememoras la tempon, kiam vi loĝis ĉe ni, kaj ni ĉiam pensadas pri vi. Miaj onkloj kaj mia 70-jara maljuna avinjo ofte min instigis skribi leteron al vi, transsendi al vi iliajn salutojn. Timante, ke mi ne povas skribi bone, mi ankoraŭ ne skribis kiam nin atingis via letero kaj la delegacio, kiun vi sendis por viziti nin. Kiel korusitaĵo estas la vilaĝanoj!

Kiam mi skribas ĉi tiun leteron, unu maljuna avino diris al mi: "En la letero diru al Prezidanto Maŭ, ke mi sentas min tre kulpa al li pro eraro de mi farita! En la jaro, kiam Prezidanto Maŭ loĝis en nia vilaĝo, foje oni projekciis filmon. La rigar-

dantoj tiel dense kunpremiĝis, ke ni virinoj infanon portantaj ne povis vidi la filmon. Pro tio mi malkontentiĝis. Ekde tiam, se kamaradoj de la registaro, laborantoj de oficejo volis ion prunti de mi, ilin mi akceptis ĉiam kun malbona humoro, kaj ne pruntedonis. Sed nur kelkajn tagojn poste la filmo estis refoje projekciata kaj ni ĝin vidis. Ĉiufoje, kiam mi ekmemoras tion, mi sentas min tre maljusta. Diru al Prezidanto Maŭ, ke mi nepre korektos mian eraron kun firma decido."

Prezidanto Maŭ, por la bono, kiun vi faris al ni, ni neniel povas sufiĉe vin danki. Ni povas nur strebadi kun plej granda klopodo al la celo kiun vi montris al ni, respondi al ĉiuj viaj alvokoj, produkti pli diligente, terkulturi pli zorgeme kaj garantiĝi ke ĉiu bone plenumos

sian laboron. Ni sekvados vian admonon: "Daŭrigu la revolucion tradicion kaj akiru pli grandan honoron!"

Kun respekto ni deziras al vi Bonan Sanon!  
sincere via  
Jen Taŭ  
Ŝipopo-Vilaĝo de Kienping-Gubernio, Hopej-Provinco.



Busto de Prezidanto Maŭ  
Skulptaĵo de Vang Ĉau-ven

# Disvoliga de Kulturaj Centroj

(daŭrigo de p. 93)

troj ankaŭ aranĝis 38 ekspoziciojn kaj 450 diskutajn forumojn dediĉitajn al la temo rezisti Usonon kaj helpi Koreion.

Ĉiu centro havas unu bibliotekon bone provizitan per libroj kaj bildgazetoj kiuj estas multe ŝatataj de la popolo. Kelkfoje la biblioteko estas movebla kaj la bibliotekistoj alportas la librojn al la fabrikoj, vilaĝoj kaj armeaj unuoj. Kaj la legajoj estas nun rakontoj pri patriotaj temoj anstataŭ malnovaj legendoj. Kulturaj kaj distraj agadoj formas la trian laborfazon de tiuj centroj. Oni multe sin okupas en la reformo de malnovaj operoj kaj en la enkonduko de distraj rimedoj al la amasoj. En Liaŝi-Provinco (遼西省), 102 libertempaj dramoprezentaj trupoj estis organizitaj de la popolaj kulturaj centroj, kiuj altiris 939.735 rigardantojn dum la pasinta jaro. Dramoj kun tiaj novaj temoj kiel "Perfortaĵoj de la Usonaj imperiistoj," "La edziĝo de Ŝiaŭ Erhej" (laŭ fame konata novelo verkita de Ĉau Ŝu-li 趙樹理), estis ludataj de la centroj en Tajjuan (太原) kaj Ĉengteh (承德).

Lanternofilmo formas alian tre ŝatatan rimedon por popola edukado. La kadroj de la popola kultura centro en Ŝijang (昔陽), Ŝansi-prov., faris 33 seriojn de lanterna lumbildoj rilate al kurantaj eventoj, higieno

kaj produktado, kiuj estis projekciataj antaŭ 85.800 homoj. En vilaĝaj foiroj estis ĉiam projekciataj lanterna lumbildoj traktantaj agrikulturan produktadon por ege stimuli la entuziasmon de la kamparanoj en produktado.

Fine, la popularigo de scienco kaj socia servo estas ankaŭ prilaboritaj de tiaj centroj. Kunlaborante kun la loka Publika Sanitara Buroo, la popola kultura centro en Vuĉang (武昌), Hupej-Prov., aranĝis lastjare ekspozicion pri higiena laboro, kies ekspoziciaĵoj inkludis grafikajojn, afiŝojn, modelojn, specimenojn, k. t. p. La ekspozicion de agrikultura produktado aranĝitan de la kultura centro en Lingtaj (靈臺), Kansu-Prov. (甘肅省), vizitis pli ol 6.000 rigardantoj en tri tagoj. La ekspozicio preparitaj de la centro en Ŝijang, Ŝansi-Prov., tuŝis tiajn specialajn temojn kiel patrinan kaj infanan higienon, riĉecon de naturprovizo de nia granda patrio, insektomortigilojn kaj novtipajn agrikulturajn instrumentojn, k. t. p.

Rilate al sociaj servoj, la popola kultura centro helpas solvi ĉiajn malfacilaĵojn por la popolanoj. Ĝi ankaŭ respondas ĉiuspecajn demandojn, abonas tagjurnalojn por la amasoj, agas kiel peranto por skribiloj, legajoj, poŝtmarkoj, k. t. p.  
Pandisho

# La Estonta Mondo, Popola Mondo (daŭrigo de p. 89)

por ĉiam finiĝis la epoko de imperiisma superrego super la mondo, pro la fondiĝo de la Socialisma Sovetio, la Ĉina Popola Respubliko kaj la diversaj Popolaj Demokratioj, pro la firma unueco inter la du grandaj landoj Ĉinio kaj Sovetio sur la bazo de la Traktato de Amikeco, Alianco kaj Interhelpo, pro la firma unueco en la tendaro de paco kaj demokratio kaj la profunda simpatio de la vastaj amasoj de pacamaj popoloj tra la mondo al la granda tendaro. Niaj malamiko ne povas vidi ĉi tion kaj ankoraŭ volas fari maljustecon al la Ĉina Popola Respubliko kaj superregi la mondon. Tamen, mi certigas al vi ke ilia revo estas malprudenta, vana kaj ne atingebla. Male, la Ĉina Popola Respubliko ne povas esti maljuste traktata, la granda paca tendaro gvidata de Sovetio ne povas esti tuŝata kaj la pacaj popoloj tra la mondo ne povas esti trompataj. Kamaradoj, de post la venko de la granda Oktobra Sovietia Socialisma Revolucio, definitive establiĝis venka situacio por la popolo de la mondo. Kaj nun, pro la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko kaj la diversaj Popolaj Demokratioj, ĉi tiu situacio disvolviĝis kaj firmiĝis. Efektive, en la periodo post la Unua Mondmilito kaj la Rusa Oktobra Revolucio la tri imperiismaj landoj Germanio, Italio kaj Japanio provis superregi la tutan mondon. Tio okazis antaŭ la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko kaj multaj Popolaj Demokratioj. Kaj tamen kio estis la rezulto? Ĉu ne pruviĝis ke la provo de la tri imperiismaj landoj estas malprudenta kaj vana? Ĉu ne rezultis ĝuste male, ke la imperiismaj landoj kiuj volis superregi la mondon estis mem venkitaj? Nun la situacio estas tute malsama. Fondiĝis la granda Ĉina Popola Respubliko kaj multaj Popolaj Demokratioj. La konscio de la popolo de la tuta mondo jam leviĝis ĝis pli alta nivelo. La lukto por nacia liberiĝo en tuta Azio kaj Norda Afriko estas kreskanta en vigleco. La potenco de la tuta sistemo de imperiismo jam ege malfortiĝis. Ankoraŭ alia ekstreme grava fakto estas, ke la potenco de Sovetio, nia plej intima aliancano, ege fortiĝis. En ĉi tia tempo, se iu ajn alia imperiisma lando provas iri la malnovan vojon de la tri antaŭaj agresantoj Germanio, Italio kaj Japanio, ĉu ni ne povas plene antaŭdiri la rezulton? Unuvorte, la estonta mondo devas esti mondo de la popolo. La landoj en la mondo devos esti regataj de la popoloj de ĉi tiuj landoj mem. La mondo certe ne povos esti plu super-tiranata de imperiismo kaj ĝiaj lakeoj. Mi esperas ke la popolo de nia lando kunigos en solida unueco inter si mem, kun Sovetio, kun la Popolaj Demokratioj kaj kun ĉiuj nacioj kaj popoloj en la mondo simpatiaj al ni, kaj daŭre antaŭeniros al venko de la kontraŭ-invada lukto, de konstruo de nia granda lando kaj de defendo al la daŭra mondopaco. Kamaradoj, se ni tion faras, la venko nepre apartenas al ni.

# Brila Sukceso en la Anti-usona Milito

De la 25a de okt. 1950 ĝis la 10a de okt. 1951 la Korea Popola Armeo kaj la Ĉinaj Popolaj Volontuloj jam ekstermis

387,000 malamikojn.

**kaptis**

10 aeroplanojn, 50 kirasautojn, 189 tankojn,

5,378 aŭtojn, 3,489 kanonojn, 60,197 pafilojn, 5,116,650 obusojn k kuglojn, 11,966 mangrenadojn.

**detruiis**

2,300 aeroplanojn, 756 tankojn, 1,906 aŭtojn,

31 kirasautojn, 69 kanonojn kaj 4 levmaŝinojn.



# La Movado de Pliprodukto kaj Ŝparo EN NORDORIENTA ĈINIO

Grandega sukceso jam estas atingita en la movado por pliprodukto kaj ŝpari egalvaloron de 5,000,000 tunoj da greno en la ŝtataj entreprenoj de Nordoriento. Laŭ statistiko farita antaŭ la 16a de Septembro la suma valoro laŭplane pliproduktota kaj ŝparota de la entreprenoj jam egalas al 10,000,000 tunoj da greno. Nun la entreprenoj estas klopodantaj mobilizi siajn fortojn, altigantaj la kreemon de la laboristoj kaj ekspluatantaj la kaŝitajn energiojn de la industrioj por sukcese plenumi sian planon de pliprodukto kaj ŝparo.

La supre diritan movadon proponis kamarado Kaŭ Kang (高崗), la prezidanto de la Popola Registaro de Nordoriento kaj sekretario de la Nordorienta Buroo de la Centra Komitato de la Ĉina Komunista Partio, en la Konferenco pri Muniĉipalaj Laboroj, kunvokita en majo de la Nordorienta Buroo de la Kompartio. Kamarado Kaŭ alvokis al la Nordorientaj entreprenoj, krom plenumi sian antaŭe fiksitan produkto-planon de tiu ĉi jaro, ankaŭ pliprodukto kaj ŝpari egalvaloron de 5,000,000 tunoj da greno. La ŝtataj kaj lokaj publikaj entreprenoj respondis al lia alvoko unu post alia kaj fiksas planon por pliprodukto kaj ŝparado post pristudo de siaj produktivo, kapitalo kaj produktokostoj. Laŭ la planoj de la ŝtataj entreprenoj oni pliproduktos kaj ŝparas egalvaloron de 10,000,000 tunoj da greno, do duoblon de tiu kiun la tasko postulas.

Nun la fabrikoj kaj minejoj estas profundigantaj agitadojn al la laboristoj kaj funkciuloj por ke la plano de pliprodukto kaj ŝparo efektiviĝu dank' al ilia plenkonscia subteno. Jam multajn ekzemplojn nun oni povas citi el la sukcesoj en pligrandigo de produktokvanto, plibonigo de la kvalito de produktajtoj, malgrandigo de produktokosto, ŝparo de kapitalo kaj grandigo de produktivo ktp. La tutlande famkonata laborteamo de Ma Heng-ĉang (馬恆昌) faris planon de tiu ĉi duonjaro pliprodukto kaj ŝpari egalvaloron de 30 tunoj da greno kaj ili jam atingis konsiderindan sukceson en plena utiligo de la maŝin-produktivo. Antaŭe, ĉiutage, dum la 8 horoj de laboro, la tempo de maŝin-irado plene utiligita por produkto estis nun 3 horoj kaj 40 minutoj sed nun 5 horoj kaj 30 minutoj. En malpliigo de fuŝaj produktajtoj, la laborteamo jam malgrandigis la procenton de fuŝaĵoj de 0.5% ĝis 0.25%. La oleprodukta grupo de Ĉang Ven-fu (張文富) de la Oleprodukto Venko en Ĉangpej-Gubernio (昌北縣) de Liaŝi-Province kreis novan rekordon de oleprodukta procento en la komenco de aŭgusto: el 100 ĝin-oj da fabo ili povas eligi 13.9 ĝinojn da oleo. Ĝis la jarfino, la grupo de Ĉang Ven-fu povos pliprodukto egalvaloron de 100,760 ĝinoj da greno. Teknikisto Li King-kun (李靜昆), kiu laboras en iu mineja maŝinfabriko, plibonigis torranĉilon kaj per tio li 24-obligis la laborefikon. Dank' al tiu nova laborilo, ĉiu torraŝino povas pliprodukto egalvaloron de 446 tunoj da greno en la daŭro de la lastaj kvar monatoj de tiu ĉi jaro. La laboristoj kaj funkciuloj de iu fabriko elpensis

157 raciigajn proponojn, el kiuj pli ol 50 estas adoptitaj de la administracio post pristudo kaj tiuj 50 proponoj elproviĝis tre bonaj. La efektivigo de la propono pri plibonigo de la fandforno sola jam povas plialtigi la kvaliton de la produktajtoj je 5 procentoj kaj pligrandigi la produktokvanton je 42%, kaj dank' al tio egalvaloro de pli ol 300 tunoj da greno pliproduktiĝos.

En tiuj ĉi lastaj monatoj, raportoj pri novaj sukcesoj en pliprodukto amase kolektiĝis antaŭ Prezidanton Kaŭ Kang. La raportoj priskribis interalie ankaŭ la kondiĉojn por efektivigo de la pliprodukto planoj kaj montris la firmdecidon de la laboristoj kaj funkciuloj por ilin efektivigi. La raporto de la laboristoj kaj funkciuloj de iu cementofabriko diris ke ili jam plenumis sian produktan taskon de naŭ

monatoj unu monaton antaŭ la limdato dank' al ekspluato de kaŝita energio kaj plialtigi la kvalito de la cemento, kiun ili produktis, dum malaltigis la produktokosto. Havante tian sperton, ili kredas, ke ili povas efektivigi la pliprodukto planon de egalvaloro de 55,800 tunoj da greno. La laboristoj de la forĝa sekcio de



La laboristoj de la sesa tornekcio de la Dua Mukdena Maŝinfabriko kunvenas por pliprodukto kaj ŝparo.

## Riĉa Rikolto post Ok Senfruktaj Jaroj

Ĉu Min-sin (朱敏信)



Riĉa tritik-rikolto sur la okcidenta bordo de Huaj-Rivero.

Sur la senlima ebena laŭlonge de Huaj-Rivero troviĝas vastaj kampoj kiuj estis konstante superakvitaj kaj "senfruktaj en naŭ el dek jaroj". Post kiam kompletigis la unuaperioda laboro en la subjugado de Huaj-Rivero, ĉi tiuj kampoj ĝenerale havigis al la kamparanoj riĉan rikolton. Interalie la kamparano de Jangtungŝiang-vilaĝo (楊曉鄉) en Lingpi - Gubernio (靈璧縣) en Nordorienta Anhuej (皖東北) estas bona ekzemplo.

Kiam la verkinto eniris la vilagon Jangtungŝiang estis la tempo kiam tritiko jam antaŭ longe metiĝis en grenejojn kaj la aŭtunaj grenoj kreskis prospere. La senlima ebena kovriĝis per densaj verdaj foliaroj de fabo kaj estis punktitaj de blankaj floroj de sezamo. Dikaj gaŭliangspikoj balanciĝadis en zefiro; en ĉiu

vilaĝo altas pajlmasoj similaj al fortikaĵoj. Antaŭ la pordo de multaj farmdomoj silente paŝtiĝis azenoj kaj ĉevaloj.

Jangtungŝiang situas ĉe la suda bordo de Suj-Rivero (濉河). Antaŭe ĝia kamparano estis tre fruktodona kaj la kamparanoj de Jangtungŝiang ĝin nomis "trezora tero" kies unujara rikolto sufiĉas por dujara konsumado. Post kiam la Ĉiang-kajŝek-a banditaro detruis la digon de la Flava Rivero ĉe Huajuanĉou (花園口), la fluejoj de Huaj-Rivero kaj ĝiaj branĉoj malboniĝis kaj ankaŭ la Suj-Rivero paraliziĝis. Ĉiujare dum somerfino kaj aŭtunkomenco la diluvo altorentanta el la supra parto de Suj-Rivero kaj el la nordaj montvaloj koncentriĝas ĉe Huejtang-koŭ (滹沱溝) nur malpli ol ses kilometrojn nordoriente de Jangtung-

iu maŝinriparejo skribis en sia raporto, ke ĉiu el la laboristoj de ilia laborekcio cerbumadas por ekspluati kaŝitan energion kaj faris personan pliprodukto kaj ŝparan planon laŭ la realaj kondiĉoj. La procento de unuagradaj produktajtoj de tiu laborekcio en oktobro jam kreskis ĝis 99.6%, kaj la produktokvanto 308-procente superis la planon.

Tre grandan signifon havas la movado de pliprodukto kaj ŝparo de la Nordorienta laboristaro, ĉar tiu ĉi movado ne nur povas plue plibonigi la administradon de la Nordorientaj industrioj, sed ankaŭ povas grandskale disvolvi la produkton. Por la egalvaloro de 10 milionoj da tunoj da greno oni povas fondi 32 modernajn ŝpinejojn kun po 50,000 ŝpindeloj, aŭ konstrui elektrejon 800,000-kilovatan, aŭ aĉeti 213,000 kompletojn da modernaj ĉevaltiraj agrikulturaj instrumentoj (ĉiu kompleto konsistas el 17 diversaj instrumentoj por plugado, sarkado, rikolto ktp.); se oni elspesuz la 10 milionojn da tunoj da greno por nacidefenda konstruo, 4,500 aersprucej batalaeroplanojn oni povas aĉeti.

Nash

ŝiang. Kaj pro tio Jangtungŝiang, same kiel miloj da aliaj vilaĝoj de la meza kaj malsupra partoj de Suj-Rivero, estis konstante inundita. Iu kamparano el Kiangkia-Vilaĝo (姜家村) diris al mi: "Nuntempe en la pasintaj jaroj senlima maro da ŝaumanta akvo etendiĝis ĉirkaŭ ni. Ekde la jaro 1943 ni nenion rikoltis aŭtune dum ok jaroj kaj ni rikoltis neniam da tritiko en tri jaroj."

"Por feliĉa ĝoja tago, al Suj-Rivero bona drago!" jen estas la slogano elkriita de la kamparanoj mem de Jangtungŝiang dum la dragado en lasta vintro kaj tiu ĉi printempo. Kiam la pli ol 600 kamparanoj de Jangtungŝiang finis la unuaperiodan dragadon de Suj-Rivero kaj revenis en sian vilaĝon, tie pli ol 500 vironoj, maljunuloj kaj geknaboj ankaŭ kompletis sian laboron: dragi dekojn da kanaletoj. Dank' al tio la pluvakvo de ĉijara tritiksezono rapide forfluis de malgrandaj kanaletoj en riverejojn kaj de la riverejoj en la nove dragitan Suj-Riveron. La akvo elfluis tre libere kaj la tritiko suferis nenian damaĝon.

Post sinsekvaj jaroj da malsatego, la kamparanoj de Jangtungŝiang ravigis kiam ili unufoje rikoltis tritikon en tiu ĉi jaro. Van Ju-lan (萬玉蘭) en Kiangkia-Vilaĝo jam tri jarojn ne rikoltis tritikon el siaj 20 muoj\* da tero. Sed ĉijare ŝi rikoltis pli ol 5 tan-ojn\* da tritiko. Kiam ŝi unufoje preparis farunon el tritiko per muililo ŝi diris al sia trijara filineto kuŝanta en ŝia sino: "Mia kara! De post kiam vi eligis el la ventro de via panjo, vi travivis du jarojn je nutraĵo por rifugiĝintoj kaj unu jaron je sav-nutraĵo donita de

(daŭrigo sur p. 93)

# LA DOGANO DE NOVA ĈINIO

Ŝih Haŭ

(daŭrigo de p. 92)  
la Popola Registaro, sed neniam je tritiko el nia propra tero. Hodiaŭ satmanĝu nian propran tritikfarunon! Mangante tamen ne forgesu la bonfaron de Prezidanto Maŭ Ze-tung."

Post tritik-rikolto, la kamparanoj klopodis elŝari grenon por aĉeti ŝarĝbrutojn. En la malsataj jaroj la nombro de la brutoj en Jangtung-ŝiang jam reduktiĝis ĝis 5, sed nun la nombro jam kreskis ĝis 28. Tuj post tritik-rikolto kamparano Ŝju Vu (許五) aĉetis por si fortikan kaj dikkan nigran azenon el loko 50 kilometrojn fora. Karesante la lanugan dorsan de la azeno li diris: "Kara azeneto: jam de kvin jaroj mi tiradis plugilon per miaj propraj ŝultroj, sed ĉijare mi jam transmetos la ŝarĝon sur vin!"

Spertinte ĝustatempan ordigon la 43 interhelaj grupoj de Jangtung-ŝiang nun sin okupas per rikolto de gaŭliango. Tenante en mano gaŭling-spikon, kamparano Ku Ki-ŝiang (顧紀香) diris kvazaŭ al sia revidata amiko longe forestinta: "Hej! jam ok jarojn mi ne vidis vin!" Lia frato Ku Ki-joŭ (顧紀友) intermetis: "Fraĉjo, ankoraŭfoje ni iru subjugi la riveron ĉijare! Unufoja riparo jam sekvigis unujaran abundan rikolton, do post kompleta subjugado de la rivero, ni certe ĝuos pli feliĉajn tagojn, ĉu ne?"

Tradukis Sunkaj

\* mu-o = 6.144 aroj

‡ tan-o = cent litroj

La dogano de Ĉinio, kiu estis administrata en la pasinteco de la imperiistoj kiuj uzis ĝin por premufoki la ekonomion de Ĉinio dum pli ol 100 jaroj, nun fariĝis fortikaĵo por protekti la nacian ekonomion. En 1950, por la unua fojo en 73 jaroj, aperis en Ĉinio favora ekvilibro de eksterlanda komerco. La amplekso de eksporto superis tiun de importado per 9.34 procentoj. La tuta kvanto de eksterlanda komerco ege superis la ĉiujaran meznombro de la statistikaj ciferoj antaŭ la Kontraŭ-japana Rezistmilito. Ĉi tio fariĝis ebla nur pro tio ke la administrado de la dogano estas nun organizo de memstara, suverena ŝtato en la manoj de la popolo.

La nova dogano protektas la junajn ĉinajn industriojn. La imperiistoj ne plu povas dumpingi siajn varojn sur la merkaton de Ĉinio por detruigi ĝian enlandan produkton, elĉerpi ĝiajn materialojn, kaj tiel degenerigi Ĉinion en la staton de postĝinta kaj duonkolonia lando, kiel antaŭe.

Antaŭ nelonge, la de imperiistoj regata Kuomintanga dogano fiksis por importataj varoj, se ĝi tion faris, eksterordinare malaltajn limimpostojn. Ili devis esti ne pli altaj ol 5 procentoj laŭvalore. Ekzemple unu funto da ĉina teo eksportita al Britlando estis impostita 465 procentojn laŭ ĝia valoro, dum unu funto da

opio importita el Brita teritorio estis impostita ne pli alte ol 5 procentojn.

En 1936, fabrikataj kaj duonfabrikataj varoj okupis 76.32 procentojn de la importado de Ĉinio, dum maŝinaj kaj instrumentaj esencaj por industria produktado nur 6.37 procentojn.

Tamen, en 1950, unu jaron post la liberiĝo, importitaj varoj ĝenerale sin limigis al la kategorioj de industriaj krudmaterialoj, maŝinoj, diversspecaj ekipaĵoj, sterko kaj pakaj materialoj, ĉiuj esencaj por industria kaj agrikultura produktado.

La impostoj sur importitaj estas fiksitaj por protekti ŝtatan kaj privatn produktadon kontraŭ la konkuro de fremdaj komercaĵoj. Ekzemple, por protekti la industrion de cigaredoj, kiuj povas esti grandkvante produktataj en Ĉinio nun, la doganimposto sur importitaj cigaredoj estas levita de 200 procentoj antaŭ la liberiĝo ĝis 400 procentoj. Rizo estis produktato liberigita de ĉiuj ajn importaj impostoj antaŭe, sed ĝi devas pagi doganon de 20 procentoj, ĉar Ĉinio estas produktanta sufiĉan rizon por ĝia konsumo, kaj fakte ĝi eĉ havas sufiĉan kvanton por eksporti al Hindio. La limimposto sur kudromaŝinoj estis 15 procentoj en la pasinteco, sed nun levita ĝis 60 procentoj pro tio ke tiaj maŝinoj estas fabrikataj en nia lando.

La varoj kiujn Ĉinio produktas

nesufiĉe kiel industriaj ekipaĵoj, krudaj materialoj, agrikulturaj maŝinoj, komunikaj ekipaĵoj, instrumentoj uzataj en astronomio, aviado, kaj navigacio, raraj metaloj, cerealaj semoj kaj sterko estas permesataj eniri la landon aŭ senimposte aŭ je malpliigitaj procentoj. Kelkaj medicinoj, por kiuj enlandaj anstataŭaĵoj estas ankoraŭ ne troveblaj, sciencaj libroj kaj grafikaj, kaj artikloj por la ekstermigo kaj antaŭgardo de agrikulturaj malutilaj insektoj, k. t. p. ankaŭ ĝuas la saman zorgon.

Granda sukceso estas atingita por transformi la koruptan kaj burokratigan organizon de la malnova Dogana Administracio en unuigitan, centritigan kaj efikan organizon. La nova Dogana Administracio ne plu okupas sin en ĉiuj tiuj funkcioj kiuj simple reprezentis imperiistan agreson kaj havis nenian rilaton kun doganaj servoj. Ekzemple, la administrado de havenoj, akvovojoj kaj la havenburooj de la diversaj urboj kaj havenoj. La respondeco de marborda patrolado estas transdonita al la Ministerio de Publika Sekuro.

La estraro de la dogano de nova Ĉinio ne plu disponas la limimpostojn laŭ sia propra volo, nek akiras pruntojn de fremdaj potencoj, nek kolektas "kompensmonon" kiun la fremdaj imperiistoj devis la ĉinan popolon pagi, kiel la malnova dogano faris antaŭ la liberiĝo. Sin trovas ne plu fremda Ĝenerala Inspektoro, kiu krom administri la doganon ĉiam ludis politikon, manipulis la cirkulantan monon kaj financojn, kaj influis eksterlandan komercan politikon.

En la pasinteco la de imperiistoj regata doganejo estis starigita profunden en la enlandaj urboj kiel Ĉungking (重慶), Vanŝien (萬縣), Ŝaŝi (沙市), k. t. p., kelkcent mejlojn for de la marbordo. Ilin la imperiistoj uzis por dumpingi siajn malkarajn varojn tiel enlandan por konkuri kun la naciaj komercaĵoj kaj ebligi al si la aĉeton de la ĉinaj krudaj materialoj per malgrandaj prezoj. Hodiaŭ el la 173 doganejoj, 103 estas abolitaj pro senbezoneco.

La malracia kaj komplika procedo de dogan-inspektado kaj var-taksado en la antaŭaj tagoj estas ankaŭ multe simpligitaj kaj unuigitaj. Sekve la transfluo de varoj, kiu estis antaŭe malhelpata de burokrataj formalaj kaj koruptado, nature rapidiĝas. Nun la eksportisto nur bezonas tri horojn por kompletigi la tutan procedon de doganpago, kiu bezonis unu plenan tagon antaŭe.

La korupta sistemo de fremdaj komisaraj kaj Ĝenerala Inspektoro estas forigita por ĉiam. Antaŭ la liberiĝo 20 procentoj de la doganaj impostoj estas uzataj por administraj elspezoj. Duono estis por la pago de salajroj kaj subvencioj al la neĉina oficistaro. La Ĝenerala Inspektoro sole ricevis jaran salajron de US \$33,600, kun diversaj subvencioj krome. La nova dogano malpliiĝis la administrajn elspezojn ĝis 2.5 procentoj.

Kune kun la renverso de la regado de la imperiistoj en la dogano kiu simbolis la fremdan regadon en Ĉinio, la ĉina popolo jam decidis neniam lasi la suverenecon de sia patrio refoje elgliti el siaj manoj.

Tradukis Ma Dion

## Disvastigo de Kulturaj Centroj en Ĉinio

Popolaj kulturaj centroj dediĉitaj al la klerigado de la laborantaj popolamasoj estas nun tre popularaj en Ĉinio. Tia formo de populkeriga organizo estis unue iniciatita en Kalgan en 1945, kaj poste enkondukita en Nordorientan Ĉinion en 1946 kaj en Sekiaĉuang (石家莊) en 1947. Sekvante la liberiĝon de ĉina ĉeftero, ĝi estas iom post iom disvastiĝanta tra la tuta lando.

Laŭ fidindaj statistikoj, tuj post la liberiĝo troviĝis en Norda Ĉinio 155 centroj, kiuj pliiĝis lastjare ĝis 236. Nuntempe ili nombriĝas 337. Laŭ la statistiko de aŭgusto, 1950, sin trovis 179 tiaj centroj en Orienta Ĉinio kaj 166 en Centrasuda Ĉinio. Tamen rapida plimultiĝo estas raportita el la ambaŭ supre menciitaj administraj regionoj. Sole en Ĉekiang-Provinco (江蘇省), nun estas 92 popolaj kulturaj centroj; en Honan (河南), 101; kaj en Hupej (湖北), 76. Samspecaj centroj estas starigataj en multaj urboj en Sudokcidenta Ĉinio. La plej bonaj centroj estas tiuj en Dajren kaj Port-Arturo, kie la Sovetia sistemo por administri tiajn centrojn estas adoptita kun okulfrapa sukceso.

La agadoj de la kulturaj centroj estas ĝenerale en kvar flankoj:

Unue, la centro turnas la plejparton de sia atento al la kleriga laboro inter la popolamasoj. Ĝi starigas diversajn klerigajn klasojn, vesperlernejojn kaj popularlernejojn. La 11 centroj en Tienzino (天津) planis elimini 10,000 analfabetojn pere de tiaj klerigaj laboroj en la lasta jaro. Sole en la No. 8 Popola Kultura Centro, pli ol 1,400 lernantoj partoprenis lernadon en la daŭro de tri



Kultura Palaco de Laboristoj

Lignogravuraĵo de Ku Juan

monatoj lastjare. En la Nordoriento, 699,000 laboristoj kaj civitanoj el aliaj sekcioj partoprenis en 16,744 klerigaj klasoj, popularaj vesperlernejoj, laboristaj vesperlernejoj k. s. kaj en 4,936 jurnallegaj grupoj aranĝitaj de la popolaj kulturaj centroj. En Hangĉou estis formitaj 433 klerigaj klasoj, kies tuta nombro de partoprenantoj atingas 15,000 laborantojn.

Due, la popola kultura centro ankaŭ funkcias kiel informa centro kiu disvastigas novaĵojn kaj informon pri specialaj temoj al la popolo. La centro propagandis la novan Geedzigan Leĝon inter la virinoj kaj la kampanjojn por Ĉini-Sovetia amikeco kaj porpaca subskribo inter la popolamasoj. Ĉi tia laboro instigas siavice la plimultiĝon de la agadoj

de la centro kaj el la disvolviĝo de la tutmonda situacio kreskadas la bezono de pli multaj novaj centroj.

La propagandiloj por la kuranta situacio uzataj de la centro estas ja multnombraj. Ekzemple, nigratabulaj gazetoj, mimeografitaj gazetoj, radio-reto, ekspozicioj de karikaturoj kaj aliaj bildoj, strataj libretoj, dramoprezentadoj, k. t. p. Dum la kontraŭ-usona porkoreia propaganda kampanjo, la popolaj kulturaj centroj en Mukdeno organizis 21 dramoprezentajn trupojn, kiuj altiris 1,100,000 rigardantojn. Propagandaj agadoj en la stratoj pere de radio-reto, karikaturoj kaj jurnallegaj grupoj estis okazigitaj por la bono de ĉirkaŭ 9,400,000 popolanaj. Krome, la cen-

(daŭrigo sur p. 90)

# La Kotonmaŝino

Ma Feng\* (馬峰)

I

En Ĉangciauung-Vilaĝo (張家莊) estas metiisto nomata Joŭ-joŭ (有有), kiu scias lerte arkvatigi kotonon. En la vilaĝo, metiistoj, ĉu masonisto, ĉu ĉarpentisto, ĉu forĝisto, laŭ-kutime ĉiuj estas titolata "majstro" kun sia familia nomo. La familia nomo de Joŭ-joŭ estas Sung (宋), kaj oni nature nomas lin Majstro Sung.

Majstro Sung estas maljunulo ĉirkaŭ 50-jara. Lia edzino mortis jam antaŭ longe, kaj nun en la hejmo restas nur li kaj lia 18-jara filino, nomata Siaŭ-oh (小娥). Ŝi estas kapabla en laboroj endoma kaj surkampa, kaj ne estas maibela. Ŝi estas tre amika kun Ĉang Paŭ-paŭ (張寶寶), lernanto de Majstro Sung. Laŭ nia diro, ili amindumas propra-vole. Kvankam neniu publike diris al Majstro Sung pri tio, tamen li jam iom divenis. Li amas Siaŭ-oh kaj ŝatas Paŭ-paŭ, tial li estas tre kontenta pri la afero kaj kelkfoje eĉ intence lasas ilin havi la ŝancon interbabilu kune.

Kiel homo ŝercema, Majstro Sung estas multe ŝatata de ĉiuj en la vilaĝo. Kie troviĝas Majstro Sung, tie tuj estiĝas gaja atmosfero. Pro tio, ke li estas ofte kovrita de kotonlanuĝoj, oni kreas por li multajn kromnomojn, kiel "Maljuna Kotonon," "Fraŭlino Kotonon" ktp. Sed per kia ajn nomo li estas vokata, li ĉiam respondas kun bona humoro. Kiam fraŭlinoj vokas lin per la nomo "Fraŭlino Kotonon," li ekimitas fraŭlinon en ĉina opero, kun unu mano ĉe la talio kaj la alia apoganta la mentonon, kaj per voĉo koketa elvortigas:

"Mi, fraŭlino, nun 18-jara, deziras trovi bonan amaton laŭ mia propra volo!" Kaj kantante, li iras danĉpaŝe al la fraŭlinoj ĝis ili ne plu spirpovas pro ridego, kaj nur tiam li kontente foriras.

Plej interese estis dum okazo en majo, lastjare (1949). Kiam, post la celebra kunveno por la liberigo de Tajjuan (太原) ĉiuj staris en cirklo por rigardi la Jangodancon de la Vilaĝa Dramtrupo, subite aperis strangulo en skarлата robo. Li estis neniu alia ol Majstro Sung, kiu jam estis freŝe razita, kun la vizaĝo smirita per blanka faruno, kaj du ruĝaj paprikaj pendantaj de sub la oreloj. Brakumante volvaĵon da blanka kotonon en unu mano kaj tenante kotonbatilon en la mano alia, li sin pusiis en la scenejon kaj ekkantis per virineca voĉo:


Venku super Tajjuan-urbo, ĝojo en ĉies koro,  
Kvazaŭ forigas trabon de sur la korpo.  
Kotonbatiloj fariĝas okupata,  
Kotonarkoŝ sonoras Peng-peng-peng-ade,  
Aj-jo, jo-jo-jo,  
Fraŭlino klopodas en produktado!

Tiun kanton li mem improvize komponis. Kantante li aliĝis la jango-trupon. Per senordaj paŝoj, li saltis kaj zigzagis inter la dancantojn, grimacante kaj svingigante. Tio ege ridigis la apudstarantojn: iuj balanciĝis antaŭen kaj malantaŭen, kaj aliaj ridis ĝis larmoj elfluis. Eĉ la dancantoj kaŭriĝis surtere, ne povante sin rektigi pro ridego. Tiam, ankaŭ lia filino Siaŭ-oh estis inter la jango-dancantoj. Ŝi falis sur alian dancantinon pro ridego, kaj spiregante ŝi diris: "Paĉjo, ne estu petolema!" Majstro Sung respondis ridante, "Jen filino volas disciplini sian patron! Estas permesate al vi gejunuloj sinamuzi, kial ne al mi maljunulo!" Kaj tion dirante li denove ekdancis.

Post la liberigo de Tajjuan en la tuta Ŝansi-Provinco regis paco. Ne plu necesis al loĝantoj de Ĉangciauung plenumi brankard-servon aŭ aliajn porarmeajn laborojn; ne plu necesis ankaŭ la taktiko "malpleniĝi la domojn kaj la kampojn," aŭ gardostari sur posteno. Mankajoj kaŝitaj en la tero estis elterigitaj. Iuj kelkope aĉetis ŝarĝbrutojn kaj aliaj organiziĝis en interhelpaj grupoj por kulture virgan teron. Ĉiuj interesiĝis, tutkore kaj tutanime en produktado. La kelk-

cent muoj da koton-kamparo ĉe la riverbordo ekster la vilaĝo, kiun antaŭe oni plugis nur du-tri-foje, ĉijare kun pli da libertempo, oni plugis ses-sep-foje. Pro la pli granda klopodo, pli bone kreskas la kotonon kreskinta ĉijare ol en iu ajn alia jaro. Ĝuste post la kolekto de la unua rikolto, multaj klientoj vizitis Majstro Sung. Ĉi tiu diris, "Majstro Sung, ĉijare vi devas arkvatigi por mia familio unue!" Kaj tiu ankaŭ diris, "Majstro Sung, interkonsentu, ke vi pli frue arkvatigu por mia familio!" Majstro Sung faris promesojn al ĉiuj klientoj, ĉar fakte en la vilaĝo troviĝas neniu alia kotonvatigisto krom li kaj lia lernanto Ĉang Paŭ-paŭ. Dum kelkaj tagoj, ili ambaŭ sinokupis per purigo de la orienta ĉambro kaj pretiĝis la kotonarkon por la laboro.

Unu tagon, la patrino de Er-tan (二張) vizitis Majstro Sung. Ŝi estas ankaŭ babilema kaj ŝercema maljunulo. Enirinte la domon, ŝi ride ekparolis, "Maljuna Kotonon, se vi ne laborus por mi unue ĉijare, mi ja ne vin pardonos!" Majstro Sung respondis, "Mi ne havas tempon, mi iros al Tajjuan!" La patrino de Er-tan demandis: "Ĉu



Reciproka Helpo en Ŝpinado kaj Teksado

Novjara bildo de Ku I-ĉou

vere? por kio vi tien iros?" Kaj Majstro Sung ŝercis: "Por aĉeti grandajn ruĝajn florojn por vin beligi!" La patrino de Er-tan ride riproĉis: "Vi aĉulo! vi aĉulo!"

Vidante la patrino de Er-tan eniri, Siaŭ-oh jam ruĝiĝis kaj retirigis el la ĉambro. Post momenta ŝercado, la patrino de Er-tan diris kun grava mieno, "Mi venas por interligi vian familion kun alia per geedziĝo!" Majstro Sung diris: "Por vi aŭ por mi?" la patrino de Er-tan diris: "Ne plu ŝercu, estas por via Siaŭ-oh. Ili ambaŭ jam interkonsentis en ĉio. Mi nur venas al vi la bopatro por faciligi la aferon. Ni nepre trinkos geedziĝan vinon."

Majstro Sung jam komprenis ke ŝi parolis pri Siaŭ-oh kaj Paŭ-paŭ, sed li intence demandis: "Kies filon vi aludis?" La patrino de Er-tan diris: "Ne plu ŝajnigu, ke vi nenion scias! Ĉu vi ankoraŭ ne klare vidas laŭ iliaj gestoj kaj sintenoj? Estas via propra disĉiplo Paŭ-paŭ!" Majstro Sung ankoraŭ intence skuis la kapon: "Ĉi tiun aferon mi ne aprobas!" La patrino de Er-tan malpacientiĝis: "Rigardu, vi maljuna obstinulo! Nun libera geedziĝo estas en modo. La juna paro jam interkonsentas, kial vi ankoraŭ estas tiel kritikema? Paŭ-paŭ ja estas plej bona bofilo, eĉ netrovebla kun lanterno en mano. Simpla kaj honesta, tiel aktiva en sia ofico kiel kapitano de milica taĉmento dum antaŭaj tagoj! Kiu en la vilaĝo ne laŭdas lin kiel bonan junulon! Plue, estinte majstro kaj bopatro signifas intimecon plus intimeco. Vi ja ne avaras al li vian teknikon, ĉu vi avaras al li vian filinon?" La patrino de Er-tan detale menciis la bonon de Paŭ-paŭ, sed Majstro Sung simple skuis sian kapon. Finfine, vidante ke la patrino de Er-tan jam preskaŭ koleriĝis pro malpacieneco, li diris: "Mi jam de

longe tion deziras. Kaj mi eĉ decidis ke la ceremonio okazu ĉivintre. Kiu bezonas vian superfluan babilaĉon?" La patrino de Er-tan ride riproĉis: "Fi al vi, Maljuna Kotonon! jam sekigi al mi la buŝo por vin konvinki!"

Novajo pri gefianĉiĝo de Siaŭ-oh kaj Paŭ-paŭ tre rapide disvastiĝis tra la vilaĝo. Ĉiuj diris ke la paro fariĝos bonaj geedzoj. Ambaŭ Siaŭ-oh kaj Paŭ-paŭ estis tre ĝojaj, kompreneble. Estante gaja homo, Majstro Sung nun fariĝis pli ŝercema kaj parolema, ĉar jam decidiĝis la tutviva afero de lia filino, kaj pli kaj pli grandiĝis la nombro de klientoj kiuj antaŭarangiĝis kotonvatigadon. Kiam oni menciis pri fianĉiĝo de Siaŭ-oh, li ĝoje ridis: "Estas ĉe mi nur ĉi tiu filino; en la venanta vintro post la kotonvatiga laboro, mi arangoŝ por ŝia granda feliĉa afero!" Eĉ al maljunulinoj li nun ŝatis iom ŝerce babilu.

Sed neniu antaŭvidis ke post ne longe kiam estis tempo por komenci la vatigadon de kotonon, Majstro Sung subite ŝanĝiĝis en sia temperamento. Vere, li fariĝis tute alia Majstro Sung. Renkontante aliajn, li ne plu ŝercis, kaj eĉ tute ne parolis. Sur liaj okuloj kaj brovoj ĉiam montriĝis terura kolero. Se iu vokis lin per lia kromnomo, li tuj kolere fiksrigardis tiun dirante: "Mi ja ne estas homo toleranta insulton!" Precipe kiam oni menciis pri la fianĉiĝo de Siaŭ-oh li des pli kolere kaj ĉiam respondis feroce: "Mi dekomence ne aprobas tiun ĉi parenĉigon!"

II

Per malmultaj vortoj oni ne povas klarigi la ŝanĝiĝon de la temperamento de Majstro Sung. Ni rakontu ekde la komenco.

En la vilaĝo estas kooperativo, kiu okupas la korton antaŭ tiu de Majstro Sung. La tutan kortaron antaŭe posedis bienulo. Post la agrara reformo, la interna korto estis disponita al Majstro Sung kaj alia sendoma familio, kaj la fronta korto iris al la kooperativo. Jam kelkajn jarojn funkciadas la kooperativo, kiu, krom vendo de ĉiutagaj necesajoj, ankaŭ posedas koton-desemigan maŝinon. Ĉiujare, post la rikolto, la vilaĝanoj unue sendas la kotonon al la kooperativo por desemigi kaj poste al Majstro Sung kaj Ĉang Paŭ-paŭ por arkvatigado.

Kiam Taj-juan estis liberigita, la negoco de la kooperativo pli ampleksiĝis. Tio inkluzivis ankaŭ transportadon kaj vendadon de varoj.

Je la fino de julio, ĉijare, administranto Ĉang la Pliaga (張老大) de la kooperativo iris al Tajjuan por aĉeti vendajojn. Timante ke unu homo ne povus atenti pri ĉio, li petis Ĉang Paŭ-paŭ kuniri kun li. Kiam Ĉang Paŭ-paŭ konsultiĝis kun Majstro Sung, la lasta diris: "Bone, iru, estas avantaĝo por junuloj iri al la vasta mondo por pli da spertoj. La promesitan laboron en kotonvatigado mi komencu unue sola!"

Kun du bestoj portantaj grenojn, Ĉang Paŭ-paŭ kaj Ĉang la Pliaga vojaĝis por duona monato kaj revenis el Tajjuan kun la aĉetitaj varoj. Tiun tagon en la korto de la kooperativo regis bruo kaj ekscito, kiel dum dramo-prezentado aŭ foira tago. La tuta vilaĝo, viroj kaj virinoj, aguloj kaj junuloj iris en kaj el la korto por vidi la varojn el la provinca ĉefurbo. Iu demandis, kiom kostas skatoletoj da alumetoj; alia demandis pri la prezo de farbo por ĝramo; ankaŭ aliaj volis scii pri la prospera kondiĉo en la urbo kaj pri la aspekto de vagonaroj kaj aŭtomobiloj.

La objekto kiu plej allogis la atenton de la vizitantoj estis iu nove-aĉetita maŝino. Multaj homoj ĉirkaŭstaris ĉirkaŭ ĝi, iuj karesante ĉi tiun parton kaj aliaj rigardante tiun parton. Nentu eltrovis, kio estas tiu ĉi strangajo. Tiam da demandoj verŝiĝis super Ĉang la Pliaga, ke li ne povis samtempe respondi. Finfine, li suriris ŝtuparon kaj ekparolis pri ĝi. Li informis la aŭskultantojn, ke tio ĉi estas maŝino por vatigi kotonon kaj ke per ĝi oni povas vatigi du ĝis tri cent ĝin-ojn (=½ kg.) potage, dekoble pli rapide ol per la kotonarko. Kun tiu ĉi maŝino, li diris, ne plu estos malfacilo pri kotonvatigado. Fine li ŝeigiis la vilaĝanojn: "Ĉi tiu maŝinon pruntedonis al ni la Komerca Kompanio, al kiu poste ni nur

bezonas liveri varojn kiel porkharojn, ovojn, kaj tio estas ĉio! Kaj laŭ vortoj de la distrikta kamaradoj, tio estas 'Interhelpo inter urbo kaj vilaĝo.' Tiam multaj homoj denove urĝe demandis pri aliaj aferoj: "Vatigi kotonon per maŝino, ĉu vere aŭ malvere?" "Kiu scipovas manipuli ĉi tiun maŝinon?" Kaj Ĉang la Pliaga respondis: "Kiel tio povas esti malvera? Ni propraokule vidis ĝin funkciigi en Tajjuan, alie ni ne aĉetus. Nia Paŭ-paŭ jam ellernis kiel ĝin manipuli!"

La homoj nun ĉirkaŭstaris ĉirkaŭ paŭ-paŭ. Iuj kalkulis kiom da boltoj kaj ŝraŭboj sin trovas sur la maŝino; aliaj demandis kiel ĝin funkciigi. Junuloj goje kriis: "Kamaradoj en la Distrikta Oficejo ofte diris ke en Sovetio ĉio estas farata per maŝinoj. Nun ankaŭ ni vatigas kotonon per maŝino. Post kelkaj jaroj, ankaŭ en terkulturo ni uzos maŝinojn, kaj baldaŭ nia lando fariĝos tia kiel Sovetio!"

Ĉi tiun tagon, Majstro Sung ankaŭ venis al la fronta korto. Iom ekzameninte la koton-maŝinon, li kaŭriĝis apude kaj ekfumis. Multaj maljunuloj lin ĉirkaŭis. Ili sciis, ke li estas spertulo en koton-vatigado, kaj demandis lin ĉu maŝino povas esti uzata en la laboro. Majstro Sung skuis la kapon, dirante: "Vatigi kotonon, vatigi kotonon, de miaj prapatroj ni ja uzas arkon por la vatigado! Kiu el vi iam vidis ke per maŝino oni povas vatigi kotonon?" La patrino de Er-tan daŭrigis: "Ja, ni eĉ ne aŭdis pri tio. Mi ne kredas, kiel ajn alte Ĉang la Pliaga ĝin laudas. Maljuna Koton, iel ajn, mia kotonu estu vatigita de vi mem!" Aliaj ankaŭ komentis: "Eĉ se estus eble vatigi kotonon per maŝino, kiu sciis pri la rezulto!" "Atendu, kaj vidu kio rezultigos!"

Tiun vesperon, post la disigo de la homoj, Ĉang la Pliaga kaj Paŭ-paŭ iris viziti Majstron Sung en la interna korto. Paŭ-paŭ kunportis ĝinon da frandaj farunaĵoj el Tajjuan. En la komenco, ili parolis pri la vivo en Tajjuan, kaj poste ilia parolo turniĝis al la temo pri kotonvatigado. Ĉang la Pliaga proponis, "Majstro Sung, laŭ mia opinio, vi plibone ankaŭ lernu uzi la maŝinon, kaj ankoraŭ vi, majstro kaj lernanto, kunlaboru." Majstro Sung ridis kaj skuis la kapon: "Mi ne fidus je tia artifiko, mi fidus je mia propra tekniko!" Ĉang la Pliaga diris: "Via kotonarko ne plu estas en modo." Poste, li rakontis multe pri la avantaĝoj de la maŝino. Paŭ-paŭ ankaŭ petis ke Majstro Sung lernu manipuli la maŝinon. Longe ili parolis, sed Majstro Sung simple skuis la kapon. Precipe ĉagrenaj al li estis la vortoj de Paŭ-paŭ. Li sentis ke Paŭ-paŭ estas homo ne dankema, kiu forlasinte la metion de li pacience instruitan, kaj deflankiĝinte al tia hereza vojo, obstine sin miksis en tia diabla afero maŝino. Tiam li ege volis riproĉi Paŭ-paŭ-n, sed pro la ĉeesto de Ĉang la Pliaga, ne estis konvene tion fari, kaj li nur diris finfine: "Tiu-okaze, vi ne plu kunlaboros kun mi en la vatigado? Bone, vi uzu vian maŝinon kaj mi, mian kotonarkon!" Tiel finiĝis la vizito tiuvespere.

La tuta vilaĝo estis en agitado post la aĉeto de la maŝino fare de la kooperativo. Dum sinsekvaj tagoj, ĉie aŭdiĝis diskuto pri la afero. Kiom multaj la homoj, tiom diversaj la opinioj, kaj aperis ĉiaj opinioj.

Nun la desmigata maŝino ĉe la kooperativo jam komencis labori. Ĉang la Pliaga estis okupata akiri klientojn por la vatigmaŝino. Li parolis pri la rapideco, kompetenteco kaj malalta laborkosto de koton-maŝino. Sed, kiel ajn bone li parolis, neniu sendis kotonon al la kooperativo por vatigado. Ĉiuj kredis al Majstro Sung; kiu sciis, kian rezulton donos la maŝino? Kaj neniu volis fari tian riskan negocin. Poste, Ĉang la Pliaga sendis sian kotonon al la kooperativo. Dum la kelkaj tagoj kiam Paŭ-paŭ ekuzis la maŝinon, en la kooperativo ankoraŭfoje fariĝis tiel brue kaj ekscite kiel dum dramludo aŭ foiro. Iuj venis vidi la bruan eksciton, aliaj la strangajn kaj ankoraŭ aliaj venis kun kotonu vatigita de Majstro Sung kaj komparis ĝin kun tiu vatigita de la maŝino, por

vidi kiu estas pli bone prilaborita. Post kelkaj tagoj de ekscito, iom post iom venis la vilaĝanoj al la kooperativo kun sia kotonu por vatigado.

En la komenco, kvankam sintrovis en la vilaĝo koton-maŝino, klientoj al Majstro Sung nemalmultigis. Li estas bonkonata veterano, kiu prilaboris sperte, tiel ke la kotonu de li vatigita estis kvazaŭ delikata kaj elasta lanugo, sen iom da krudaĵo. Plue, li neniam surŝprucigis akvon sur la kotonon, neniam forŝtelis el la donita kvanto. Li allogis la klientojn per sia bona laboro, per sia fidindeco. Antaŭe, li laboris kun sia lernanto Paŭ-paŭ. Nun li laboris sola, kaj tial fariĝis des pli okupata. Sur la tero amasiĝis pakajoj da kotonu senditaj de la klientoj, kaj la briklito fariĝis la kampo por kotonvatiga laboro. Dum la tuta tago, kun la kotonarko en unu mano kaj la ligna batilo en la alia, li staris apud la briklito kaj laboris. Lanugeroj de kotonu flugis tra la aero; la kotonarko sonoris: Peng-peng—dang, peng-peng—dang.

Post la munto de la maŝino en la kooperativo, Siaŭ-oh multfoje iris al la fronta korto. Paŭ-paŭ donacis al ŝi kelkajn objektojn el Tajjuan: ruĝan celuloidan kombilon, rondan speguleton kaj desegnitajn naztukon. En la vespero de sia reveno el Tajjuan, Paŭ-paŭ jam sekrete donis ĉion al Siaŭ-oh. Post tio, Siaŭ-oh ĉiutage kelkfoje elprenis tiujn objektojn kaj kaŝe rigardis ilin. Tiam ŝi sentis ian strangan varmeco en sia koro. Ĉu



Lego- kaj skribo-lernado

Novjara bildo de Siaŭ Su

kun kialo, ĉu sen kialo, ŝi iel trovis okazon iri al la ĉambro kie Paŭ-paŭ vatigas kotonon. Eĉ rigardo tra la fenestro donis al ŝi plezuron. Paŭ-paŭ sidis tuttage apud la maŝino, kun la du piedoj senĉese manipulantaj, la du manoj seninterrompe aldonantaj krudan kotonon al la maŝino. Siaŭ-oh staris apude kaj rigardis. De tempo al tempo ŝi helpis lin volvi la vatigitan kotonon aŭ transdoni la nevatigitan krudan kotonon. Ili ne interparolis, kvankam iliaj okuloj ofte interrenkontiĝis.

Reveninte el la fronta korto, ĉiufoje Siaŭ-oh diris al Majstro Sung: "Paĉjo, la maŝino ja rapidege laboras! Kaj oni devas pagi por la servo nur duone tiom kiom al ni!" aŭ "Paĉjo, ankaŭ vi lernu kiel manipuli maŝinon. Oni diras ke la kooperativo aĉetos alian!" Aŭdinte tion, Majstro Sung ĉiam tiel respondis: "Mi dependas de mia propra tekniko, ne de tia diabla herezaĵo." Kaj li ofte admonis al Siaŭ-oh: "Helpu al mi ordigi la kotonpakojn, ne iru ĉiam al la fronta korto!" Tiel Siaŭ-oh povis nur helpi sian patron ordigi la kotonon, kun maltrankvila koro kaj ĉiam sopirante al la fronta korto por ekrigardi.

Antaŭe, Majstro Sung vatigis la kotonon dufoje, sed nun li vatigis trifoje. Tiel pli elasta kaj delikata fariĝis la prilaborita kotontavolo. La batilo pli energie frapis kaj la arkkordo pli alte kaj pli rapide vibris. Majstro Sung penadis kaj ŝvitegis, sed kun firma volo li rifuzis ripozon. Nokte li longe laboris sub lamplumo. Li decidis konkuri per sia tekniko. Aŭdinte la zumadon de la kotonmaŝino en la fronta korto, li des pli sin kuragiĝis al laboro. Li pensis al si: "Mi vatigas kotonon jam dum duono de mia vivo, estas neeble ke mi malvenkus sub mia propra lernanto!"

Sed, kiel ajn Majstro Sung klopodis, la klientoj ege malmultigis post malpli ol dek tagoj. Unue, tiuj, kiuj faris buŝkontrakton kun li, nun tamen ne sendis al li la kotonon; poste oni eĉ forprenis la jam alsenditan ankoraŭ ne vatigitan kotonon. Sed ili ne konsideris konvene diri, ke ili volas sendi ĝin al la kooperativo, kaj des pli ne deziris diri, ke Majstro Sung laboras malrapide kaj postulas pli altan pagon. Ili nur diris pretekste, ke ili petos vatigi la sekvantan jaron, ĉar estas ne eble vendi tiom da kotonu dum mallonga tempo. Tiel, la amasigitaj pakajoj da kotonu sur la planko en la ĉambro de Majstro Sung malmultigis tagon post tago. Finfine restis nur la pakajo de la patrino de Er-tan. Sed la sekvantan tagon ankaŭ ŝi venis por repreni la pakajon da kotonu. La patrino de Er-tan ankaŭ pretekstis, ke ĉijare ŝi ne volas la kotonon vatigita. Tamen, kun iom da atento Majstro Sung propraokule vidis, ke ŝi portis la pakajon al la kooperativo en la fronta korto. Nun, Majstro Sung tute komprenis, li nun sciis, ke liaj klientoj estas tute forrabitaj de la kooperativo. Guste tiam, Siaŭ-oh revenis el la fronta korto, tutkorpe kovrita de kotonlanugeroj. Enirinte ŝi denove foje laŭdis pri la rapideco kaj kompetenteco de kotonvatigado per maŝino. Jam plena de kolerio, tion aŭdinte Majstro Sung eksplodis kaj ŝin riproĉis: "Jam fraŭlino de dek ok ĝis dek naŭ jaroj, por kio ĉien iradi dum la tuta tago? Ne zorgante pri la propraj aferoj en la hejmo, vi iras por helpi alian en bagatelaj laboroj! Se vi ankoraŭfoje iros al la kooperativo, atentu ke mi severe vin draŝos!" Poste, vidante la kombilon kaj speguleton de Siaŭ-oh, kiuj eksterordinare pikis al li la okulojn, li des pli kolere riproĉis, kvankam antaŭ kelkaj tagoj li jam vidis ilin kaj sciis, ke ilin donacis Paŭ-paŭ. Li tondris: "Forjetu tiajn senhontajn objektojn! Se vi kuraĝas plu intermiksi kun tiu ŝenkonsciencia diablo, ne voku min Paĉjo!" Siaŭ-oh neniam antaŭe aŭdis severan vorton el sia patro, kaj suferinte tian maljustaĵon hodiaŭ, ŝi ne povis sin reteni de plorego. Kaj Majstro Sung kriis: "Mi ankoraŭ ne mortis! Ploru post mia morto!"

La tutan tagon Majstro Sung ne iris el sia domo, sin enfermite en la ĉambro, mordata de kolerio. Li pendigis ambaŭ la batilon kaj la arkon sur la muro. Jen li riproĉis Siaŭ-oh, jen li kolertis la pipon. Vespere, post soleca drinko de du uncoj da ĉagrena vino, li kaŭris sur la briklito, kaj blasfemacis. "Vi senkora Ĉang Paŭ-paŭ! Mi instruis al vi ĉiom de mia tekniko, kaj nun vi intence min subfosas!" Kaj poste li blasfemis kontraŭ Ĉang la Pliaga pro lia kulpo aĉeti sen ia kialo tian malfeliĝigan maŝinon. Li blasfemis kontraŭ vilaĝanoj, ĉar ili malestimis lian teknikon. . . kaj li eĉ plendis kontraŭ la venko super Tajjuan. Li sentis ke la revolucio jam atakas lian propran personon! Por marŝo al Tajjuan, li ja plenumis servojn por la armeoj, kontribuis publikan grenon (agrikultura imposto), kaj neniam evitis, ĉu per ruzo, ĉu per maldiligenteco, iun ajn servon. Kaj por fari la tunelon por ataki Tajjuan-on li iam memvole donacis du pordotabulojn. Tiam li ja sincere esperis ke la bandittrupo de Jen Ŝi-ŝan (閻錫山), reakcia militaristo kiu regis Ŝansi-Provincin antaŭ la liberigo) estas rapide ekstermitaj kaj pacaj tagoj venu por ĉiuj homoj. Kiu sciis, ke la venko en Tajjuan alportis nenian alian bonon krom tio ke oni aĉetis tiun ĉi malfeliĝigan maŝinon, kiu frakasis lian propran manĝelpvon. . . Tiel senracie riproĉis Majstro Sung por iom da tempo, kaj subite, li deprenis la kotonarkon de sur la muro, kaj brakumante ĝin, ekploris, ploregis tiel korŝire, tiel malĝojege.

(daŭrigota)

Trad. Censinio

\* Pri la aŭtoro vidu P. 74, N-ro 9, vol. II.

† En koton-vatigo oni uzas kotombatilon por vibrigi la ŝnuron de la kotonarko, kiu siavice per sia vibrado faras vaton el la kotonu.



LA JAPANA POPOLO VOLAS PACON

Karaj kamaradoj,

Nun la plej grava problemo por ni estas la rearmado kaj packontrakto. Nun 6 jarojn post la finiĝo de la dua mondmilito, fine estis kontraktita la "packontrakto" en la 8a de septembro. Kion, tamen, la packontrakto alportos al Japanio kaj la tuta mondo? Ĉu pacon aŭ militon? Estas kompreneble, ke tiu ĉi kontrakto inter Japanio kaj Usono estas por nova milito. Ili, imperistoj, piede disprenas la voĉojn dezirantajn mondpacon kaj furioziĝas por kontentigi sian ambiciaĉon kaj profitaĉon. Post okazintaĵo en Koreio la industrio de Japanio komencis tuj viglan munician produktadon, kio kondukis japanan pacindustrion al konfuza stato. La paragrafo de la Potsdama Proklamo, "Al Japanio ne estas permesataj tiaj industrioj, kiuj ebligas al ĝi sin rearmi por milito" estas tute ignorata. Kaj ree japana industrio taŭgigas por invado imperiista. Oni ne bezonas diri kion ĉi tio signifas. Paco estas paniko al japanaj kapitalistoj kaj iliaj mastroj. Ili diras: "Justeco superas pacon." Sed laŭ ili nur tio, kio kontentigas ilian ambiciaĉon, estas justa. Ili kontraktis la unuflankan packontrakton, ignorante la voĉojn de la japana popolo. Sed ni, studentoj, laboristoj, inteligentuloj ne povas tion rigardi silente sen rezistado. Ni disvolvas opozician agadon en lernejoj kaj fabrikoj kontraŭ la rearmado kaj unuflanka packontrakto.



LA 15a datreveno de la morto de Lu Sin (魯迅) estis celebrata je la 19a de okt. tra la tuta lando. La Pekin-a Popola Tagjurnalo pri-skribis Lu Sin kiel la plej bonan ekzemplon de ĉina revolucia intelekto kaj alvokas al la popolo lerni pri lia obstina batalspirito kontraŭ reaciaj kaj postĝintaj ideoj. Por honori tiun ĉi grandan popolan verkiston la Popola Eldonejo fondis komisionon el eminentaj verkistoj por kompili la verkojn de Lu Sin. La unuaj volumoj de tiu ĉi definitiva eldono, komplete klarigita, aperos en la venonta jaro. Ĝi enhavos artikolojn nemiam publikigitajn en la antaŭaj eldonoj de liaj kolektitaj verkoj, kaj ankaŭ leterojn kaj reproduktaĵojn de liaj ŝatataj lignogravuraĵoj. Lia loĝejo en Pekino, kiu estis riparita de la Registaro kaj aranĝita kiel ĝi estis dum lia vivtempo, estas nun malfermata por la publiko. Kaj ankaŭ eldoniĝis rememorigaj poŝtmarkoj kun portreto de Lu Sin kaj la fama citaĵo el lia poemo esprimanta lian batalon kontraŭ la malamikoj kaj servemon al la popolamasoj.

Kun kamrada saluto  
R. E. de J. F. en  
N. U. Japanio.

La Popoloj Venkas Ambaŭ Oriente kaj Okcidente

Samideanoj, karaj kunbatalantoj! Hierau mi estis feliĉa vidi la filmon "Filinoj de Ĉinio". Mi estas tre emociita pri la filmo pro la heroeco de la virinaj batalantoj, la sceno de la akcepto de la juna batalantino al komunista partio, la juro de la batalantino servi ĝis la morto fidele al celoj de la komunista partio, la kanto "La Internacio", ĉio ĉi tre emociigis min. Precipe de la morto, de la virinoj, la mirinda disciplino, la nobla karaktero de la liberecbatalanto. La Popola Liberigo Armeo min tre impresis. Nenia plendo pro la nesufiĉa mangado, pro la longa marŝado. Vere la mondo admiras la heroajn batalantojn kaj batalantinojn de la Popolo Liberiga Armeo. Nur tia popolo gvidata de la granda komunista partio sub la granda Maŭ Ze-tung povis venki la perfideman Kuomintang kaj la Usonan imperismon. La venko de la Popola Liberiga Armeo, helpate de la tuta laboranta ĉina popolo estis grandega bato kontraŭ la imperiismo. La granda Ĉinio kun ĝiaj naturaj trezoroj, kun ĝiaj milionoj da homoj staras nun je la flanko de la tutmonda pactendaro. Kia eminenta forto! Ankaŭ ni nuntempe luktas fortege kontraŭ la provokoj de Usonaj imperiistoj komenci militon en Eŭropo. La okcidenta parto de nia patrolando servas al tiaj rabistoj kiel bazo, por prepari la novan militon, simile kiel en Koreio. La lasta "plebiscito" pri la rearmado de Germanio donis grandan baton. En nia D.D.R. 95% voĉdonis por la paco kontraŭ la rearmado. 4% voĉdonis por la milito.

Mi finas kaj salutas elkore kun miloj da batalantoj.

Via kunbatalanto Ehmig Erich el D.D.R.—Germanio

LA Popola Eldonejo en Sinkiang-Provinco, kiu tradukis kaj eldonis post sia fondiĝo en marto de la kuranta jaro la librojn "Pri Novdemokratio", "Pri Popola Demokratia Diktatoreco", "Pri Praktiko" k.a. (entute 131,000 ekzempleroj), nun estas entreprenata elĉinigi kaj eldoni "Elektitaj Verkoj de Maŭ Ze-tung" en minoritataj lingvoj. Sub la gvido de la Propaganda Fakoj de la Buroo de Sinkiang-Provinco de la Centra Komitato de la Ĉina Komunista Partio, la eldonoj unue tradukos la Elektitajn Verkojn de Maŭ Ze-tung en Ujgur-an, Hasakan kaj Mongolan lingvojn kaj eldonos la artikolojn unuope en (maldikaj) broŝuroj en 1952. En la jaro 1953 oni eldonos la tradukojn en ampleksaj volumoj. Por produkti eminentajn tradukojn de la Elektitaj Verkoj de Prezidanto Maŭ, Kontrola Komitato el spertaj tradukistoj estas fondita por kontroli la tradukojn, pristudi la klarigojn kaj unuecigi la uzitajn terminojn.

LAŬ raporto de Vicministro Kuo Mo-jo, en tiu ĉi jaro 1,780,000 gelaboristoj lernas en libertempaj lernejoj (1.24-oble pli multe ol en pasinta jaro); pli ol 190,000 vintroj lernejoj kun 25,000,000 lernantoj starigis en vilaĝoj dum la pasinta vintro; nun sintrovas 440,000 elementaj lernejoj kun pli ol 37,000,000 lernantoj, de kiuj 70-80 procentoj



Grava Informo

Dank' al la subteno kaj kunlaboro de la tutmondaj pacamaj kaj progresemaj esperantistoj nun ni jam havas la eblecon kontentigi la legantaron per pliampleksigo de nia bulteno. En la venonta jaro ni aperigos EPĈ-on en pliampleksaj kajeroj (24 p. 19cm. x 26cm.) kun pli riĉa enhavo, nealtigante la abonkoton. (La perantoj bonvolu kompenci per nia bulteno la abonantojn kiuj pagis pli ol la nove decidita abonkoto). Esperantan Kalendaron de 1952 kun plurkolora bildo ni donacos al ĉiu, kiu abonas nian bultenon por la venonta jaro antaŭ la fino de februaro, 1952.

PAGU AL NIAJ PERANTOJ

- Aŭstralio:** Steve Bennett, Flat 3, 62 Brighton Av., Croydon Park, N. S. W. (Jarabono 7s. 6p.)
- Aŭstrio:** Antonio Balague, St.-Pölten, Kirchenweg 12. (Jarabono 20 schilling-oj)
- Belgio:** Walraevens Rajmundo, Rabelais Strato, 10 Bruselo. (Postĉekkonto: 16, 43, 53) (Jarabono: 50 bfr.)
- Britlando:** (1) F-ino F. Paraige, 10 Woronzow Road, St. John's Wood, London, N. W. 8. (Jarabono 6 ang. ŝil.)  
(2) Universala Esperanto-Asocio, Herongate, Rickmansworth, (Herts.).  
(3) Collet's Subscription Department, 40 Great Russell Street, London, W. C. 1.
- Bulgario:** (1) Bulgara Esperantista Kooperativo, Sofia—Str. TRI UŜI, 15. (Jarabono 200 Lv.)  
(2) Ivan Kovacev, Sofia, str. "Iv. Bigor" no. 24.
- Cehoslovakio:** (1) Burda Rudolf, Plzen-palackeho N. ĉ. 66. (Jarabono 50 kĉs.)  
(2) Slovaka Esperanto-Instituto, T. S. Martin, Kuzmany-str. 29. ĈSR-Slovakio.
- Finnlando:** Nillo Kavenius, Niklaksenkatu 10/14 Turku 9. (Jarabono: 300 Fmk.)
- Francio:** Labor-Esperantista Federacio, 34, St. Chabrol—PARIS—X. (CCP. Paris 902-52) (Jarabono: Fr. Fr. 450)
- Germanio:** Arthur Schulze, Berlin-Lübars, Kolonie, Waldesfrieden 77. (postĉek-n 105666) (Jarabono: 6 D.M.)
- Hungario:** (1) KULTURA, Budapest, V. Akademia u. 10. (Jarabono 15 forintoj)  
(2) Marton Lajos, Bors.-u. 2, Budapest, XII. (postkonto 38.187)
- Islando:** Siguldur Gudmundsson, Falkagata 1, Reykjavik. (Jarabono 15 kronoj)
- Italio:** (Jarabono: 400 liroj)
- Izraelio:** Bencion H. Danon, Kibuc Afikim. (Jarabono: 400 prutoj)
- Japanio:** (jarabono 360 jen-oj)
- Nederlando:** (1) Heroldo de Esperanto, Harstenhoekweg 223, Scheveningen. (Jarabono fl. 3.50)  
(2) Esperanto-Grupo Vaals, Pr. Bernhard-str. 4 Vaals.
- Norvegio:** Norvega Esperantisto, Redakcsjone, Boks 942, Oslo. (Jarabono 6 kronoj)
- Pollando:** Isaj Dratwer,—Asocio de Esperantistoj en Pollando, Warszawa Marszalkowska 81/32 (Postĉeka konto P.K.O. I 8266/115) (Jarabono 12 zl.)
- Rumanio:** Rumana Esperantista Societo, Bucuresti I, Bulev. 6 Martie 15, et. I. (Jarabono: 120 leoj)
- Svedio:** Einar Adamson, Värmlandsgatan 18, Göteborg. (Jarabono 6.50 kronoj)
- Usono:** (jarabono \$1.25)

Rim: Legantoj en aliaj landoj povas pagi per respond-kuponoj (1 rk. kontraŭ 1 ekz.) aŭ egalvaloraj Esp-aj libroj (sed ne gazetoj). Senpagan specimenon ni sendos al ĉiu kiu letere postulos.

estas gefiloj de laboristoj kaj kulturistoj; eldoniĝis pli ol 310 milionoj da ekzempleroj da libroj, 475 grandaj kaj pli ol mil malgrandaj ĵurnaloj; fondiĝis pli ol 15,000 radiorecevaj grupoj; sintrovas 3,400 laboristaj kluboj en diversaj fabrikoj kaj minejoj; en pli ol 35 urboj jam establiĝis Kultura Palaco de Laboristoj; dum la ses monatoj de januaro ĝis junio de tiu ĉi jaro pli ol 110 milionoj da rigardantoj al-tiris la kinejoj, kaj mil kinotrupoj (dekoblo de la nombro de la pasinta jaro) fondiĝis por projekcii filmojn al la popolamasoj. El tiuj ĉi ciferoj oni povas vidi, kiel rapide kreskas la kleriga afero en popola Ĉinio.